

Verschiĝnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 5 (191)
MEI 1950

Vertegenwoordiger in Nederland :
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

Dokumenta Servo

KIO OKAZIS EN 1949 ?

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.
(daŭrigo)

LITERATURO.

Per la apero de la dua volumo kompletigis la verko Leteroj de Zamenhof, kolektitaj kaj komentitaj de prof. G. Waringhien. Ankaŭ ĉi tiu volumo, kiu rilatas la batalon pro Ido (1907-1914) estas tre leginda kaj havas grandan, historian signifon. Novaj beletraj verkoj tradukitaj estas : la reeldonita unua volumo de Faŭsto, de Goethe (trad. N. Bartelmes), La gajaj edzinoj de Windsor, de Shakespeare (trad. S. A. Andrew), Elektitaj rakontoj, de Elin Pelin (Bulgarujo), La alia Ameriko, de Svetoslav Minkov (Bulgarujo) kaj Leteroj el mia muelejo, de Alphonse Daudet. Kompletige ni nomas ankoraŭ la jam aliloke menciitan biografion Roza Luksemburg de la nederlanda poetino H. Roland Holst. La originala literaturo pliriĉigis per kriminalromaneto Ferio kun la morto, de la dana pastro K. Lindquist, per novspeca romano Invito al la ĉielo, de la usona esperantisto J. D. Sayers kaj per La goja podio, nova kolekto da bonhumoraj kaj satiraj poemoj de la esperanta kabareda artisto Raymond Schwartz. U.E.A. eldonigis sub la titolo Somera universitato 1948 la tekstojn de la ĉe la tiujara kongreso faritaj prelegoj. Kelkaj soci-politikaj verketoj estas : Dokumentoj de la rezistado, kompilis, trad. kaj eld. H. Theobald, Konstitucio de la ĉeĥoslovaka Respubliko kaj Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio.

Por katolikoj aperis du preĝlibretoj : Al altaro de Dio, de L. Thalmaier kaj Preĝareto, de P.M. pastro Carolfi O.M. Kelkaj verketoj pri lingvo kaj movado (eble parte jam aperintaj en 1948 ?) estas : Enketo pri internacia helplingvo (statistiko pri esperanto-instruado prilaborita de la Rousseau-instituto en Genevo) ; La Esperanto movado, ĝia historio kaj nuna stato, de ing. J. G. Isbrücker & C. Stop Bowitz ; Gvidilo tra la Esperanto-movado (suplemento 1936-1948) de G. P. de Bruyn kaj Komercaj Leteroj de C. A. Pruisen.

GAZETARO.

La plej grava nova periodaĵo estas sendube Esperanto-logio, internacia revuo por lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto. Ĝi aperos por kajeroj 48 ĝis 80 paĝaj, kaj tiu volumo kompletigis versaĵne en tri jaroj. Alia serioza noveldonaĵo estas Scienca Revuo, kiun ni jam nomis alikloke. En Aŭstrujo eka-peris monata gazeto Mondo Kuriero, kun artikoloj popularsciencaj, biografioj, rakontoj ktp., sed sen iuj rilatoj al Esperanto. Poste ĝi kunfandiĝis kun La Praktiko. Malnova fidelulo la budapesta Literatura Mondo devis ĉesigi sian aperadon.

G. P. De Bruyn

XV-a Kongreso de Fl. Ligo Esperantista

Oostende, 27-28-29 de majo 1950

PROGRAMO

sabate :

15.00 h. Malfermo akceptejoj, librostando F.E.I. (Stella Maris, Vindictivelaan 17, — apud la stacidomo)
17.00 h. Akcepto de la ĵurnalistoj (samloke)
20.00 h. Malfermo de la kongreso ; balo kun diversaj dancoj, kantoj, muzikajoj en Laiterie Royale, Hendrikaplein.

dimanĉe :

8.00 h. Malfermo de la akceptejoj.
Por katolikoj : Meso kun E-prediko de L.P.M. De Mayer (horo kaj ejo fiksitaj).
10.00 h. Fermo de la akceptejoj.
10.15 h. Oficiala akcepto fare de la urbestro (Urbdomo) — Jarkunsido F.L.E. en « Oud Oostende » — Fotografado.
13.30 h. Komuna tagmanĝo en Stella Maris.
15.00 h. Promonado sur la digo kaj vizito al ban-instalaĵoj.
17.00 h. Kunveno de la Ligestraro.
19.00 h. Esperanto-festo prizorgata de la Bruĝa sekcio kaj parolado de D-ro Manders.

lunde :

9.00 h. Ekskurso sur la maro.
11.30 h. Vizito al Thermaal Instituut.
12.00 h. Ekskurso al Breedene, vizito de la haveno kaj fiŝ-aŭkcio.
17.00 h. Oficiala fermo de la Kongreso kaj adiaŭo (Stella Maris).

Praktikaj Informoj

Sekretariejo : Sro Maeschalk, Muscartstraat, 2.
Kasistino : F-ino Clauwaert, Waterwerkstr. 20, (p.ĉ.k. n° 4850.57).
Akceptejoj : Hotel Stella Maris, Vindictivelaan 17 (tel. 728.72).
Fervoja rabato : ĉiuj kongresanoj ricevos specialan karton, kiu rajtigos ilin al 25 % a rabato por la trajna veturo.
Nederlandanoj, atentu ! Speciala aranĝo estas fiksitaj por vi : ĝiru la kontraŭvaloron de la kongresaj kostoj, laŭ la aligilo, al la LEEN-kasisto, s-ro P. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam O., — p.ĉ.k. 34563. kaj kroman sumon por via poŝmono, ĝis maksimume entute 75 g. po persono. En la akceptejoj oni donos al vi la belgan monon. Bazo : 1 g. egalas 12 bfr. Petu aligilon kaj informojn ĉe la sekretario !
Al ĉiuj ! La kongreskarto, la « fervoja karto » kaj la lastaj informoj estos kune sendataj al vi post pago de la kongreskotizo ! Ne prokrastu vian aligon — faciligu la laboron de la Kongreskomitato !

Tagordo de la ĝenerala kongresa Jarkunsido

Malfermo. — Salutoj. — 1. ĝenerala Raporto. — 2. Financa raporto. — 3. Raporto pri la U.E.A.-Agado en nia teritorio. — 4. Varbokonkurso : premioj. — 5. Rezolucio. — 6. Fermo Parolado.

KIU ESTAS S-RO DAVIDS ? ? ?

Stranga detektiv-romano tri-akta

La Bruĝa sekcio prizorgos ĝian prezentadon dum la festvespero de nia kongreso. Oni sufiĉe konas la sperton kaj famon de tiu « trupeto », por ke la sukceso estu garantiata ! Inde ! Vidinde ! Revidinde !

Unua listo de Kongresanoj

1. Sro Dhaenens, Oostende. 2-3. Ges-roj Maertens, Brugge. 4-5. Ges-roj De-brouwere, Kortrijk. 6-7. Ges-roj De Keijzer, Brussel. 8. Sro E. Coppens, Brussel. 9. Sro P. Samyn, Roeselaere. 10. F-ino A. Bernaerts, Lier. 11. F-ino R. Van Loock, Lier. 12. F-ino Clauwaert, Oostende. 13. S-ino Dhaenens, Oostende. 14-15. Ges-roj Van Gindertaelen, Mechelen. 16. Sro Mooy, Brussel. 17-18. Ges-roj Masschalck, Oostende. 19. Sro Maene, Oostende. 20. Sro De Schepper, Gent. 21-22. Ges-roj Cortvriendt, Antwerpen. 23. Dro Couwenberg, Blankenberghe. 24. F-ino Top, Veurne. 25-26. Ges-roj Iserentant, Brugge. 27. F-ino Terrijn, Gent. 28. Sro Vanneste, Oostende. 29. F-ino Allyn, Brugge. 30. Sro Debaets, Brugge. 31. Sro Maertens, Brugge. 32-33. Ges-roj Roose, Brugge. 34. Sro Dumarey, Brugge. 35. F-ino Hofman, Brugge. 36. F-ino Roose, Brugge. 37. F-ino Mallet, Brugge. 38. Sro Demylle, Brugge. 39-40. F-inoj Gallet, Oostende. 41. S-ino Vanneste, Oostende. (daŭrigota).

Ostendo, Hidropolo Baneja de Ed. Moreaux.

(daŭrigo).

La Parkfonto ne estas la unika minerala akvo trovebla en Ostendo. La freŝdata borado, profunda 350 metrojn, ellaborita en la ĝardenoj de la Regaj Galerioj, dotis la urbon per dua minerala akvo. Kies kvalitoj ankaŭ estas rimarkinde terapiaj.

La nova fonto elsprucas en la ronda saloneto, dekstre de la Banpalaco. Apud la halo situas vasta gustumejo, facile atingebla de la mardo.

Dank' al debita intenseco (250 m3 po 24 horoj) la fonto provizas samtempe la « kreno-n », terapian instalacion de la Banpalaco.

Konstruite ĉi tiun lastan, la urbo unuigis en vasta kurac-centron la multnombrajn nuntempajn eblojn de la fizioterapio kaj permesas tiamaniere ilian ĉiusezonan aplikon.

La belega konstruaĵo staranta tiel impone en la Jungbluth Aleo, estas ne nur dediĉata al la hidrototerapio sub ĝiaj plej diversaj formoj : Thalaso-Kreno — Fan-

go-terapio, sed oni ankaŭ rezervas malvaran lokon al la aliaj kuracartoj fizikaj ; mekanik-, radio-, elektro-, gimnastik- kaj sun-terapio.

Vasta universitato de aplikata fizioterapio, la Ostendaj kuracbanejoj ne limigas sian aktivecon al mildigo kaj kuracado de la malsanoj, sed montriĝas samtempe laborejo por eksperimenta esplorado.

Destine, kuracioko dank' al sia admirinda situacio geografia, Ostendo prave ambicias vicigi unuarange en la hierarkio de la enlandaj kaj eksterlandaj banej- kaj klimat-kuracejoj.

Kaj kiom da kvalitoj ĝi ne posedas por sukcese plenumi tiun taskon !

Ĉu ĝi ne havas, krom siajn mirindajn rimedojn hidromineralajn kaj sian imponegan Banpalacon, ĉion kio sub nia klimato, enhavas promesojn pri sano, forto, energio, la oran sablon de la marbordo, kaj la marverdajn ondojn de la Oceano ?

Kongresaj impresaj

Vendredon la 7-an de aprilo okaze de mia alveno en Groningen la prezidanto kaj sekretariino de la L.K.K. bonvenigas min per manpremo. « Kiom ? » « Ducent ! » « Nu, kontentige ! Ĉu ĉio en ordo ? » « Jes ! » « Kaj kio pri la vetero ? » « Nu, ĝis nun bona, sed... » « Do, ĝis morgaŭmatene je la 9-a en la kongresejo ! » « Ĝis ! »

Sabaton jam frumatene stabo da fervoruloj invadas « Harmonie », trotas tien kaj ree, elpakas kofrojn kaj kestojn, pendigas flagojn kaj aranĝas la standon de la libroservo. Iu hurlas : « kie estas la kasisto ? ! » Ĝenerala serĉado. Poste montriĝas, ke la serĉato troviĝas en alia parto de la salono. Bicikle li alrapidas, spireganle pro la streĉa pedaldado. Ectis bonega ideo de la L.K.K. disponigi biciklojn por eviti tempoperdon okaze de migrado tra la salono. Iom post tagmezo la ĉefestraranoj maĉante siajn buterpanojn laŭcirkonstace aprobe aŭ malaprobe kugestas responde al la paroloj de s-ro P. W. Baas, kiu lastfoje ŝvingas la martelon. Iom post tom la salono pleniĝas. Konataj vicagoj ekaperas ; manpremoj, salutoj... La novalvenintoj amasiĝas ĉirkaŭ la tabloj en la akceptejoj kaj superŝutas la deĵorantojn per grandparte superflujaj demandoj. Iom antaŭ la tria oni rapidas al la urbdomo por ĝui la afablajn parolojn de la vicurbestro s-ro J. de Wilde kaj gustumi groningenan teon. Reveninte en la kongresejo oni sieĝas la tablojn de la libroservo, kie s-ro Reijers argusokule gardas siajn trezorojn. Duonon post la kvara la tradicia malfermo kun parolado de la prezidanto, flagparado kaj naciaj himnoj. Deklamas s-ino R. Köhler-van Ghelder kaj salutparolas s-ro De Brouwere (F.L.E.), s-ro Van Altena (F.L.E. kaj G.A.V.E.) s-ro Puister (sekcio Groningen de F.L.E.), skota samideanino kaj anglo. Post la manĝo interkonatiga vespero kun solkantoj de f-ino A. A. Drent, akordionmuziko de s-ro S. de Jong, knabina ĥoro sub gvido de s-ro R. W. Kuiper, dancado, komuna kantado kaj pantomimo « la forrabita nobelino », prezentata de « Ekstazo ». Kapriĉo ĉevalo multe kontribuas al la ĝenerala gajeco kiu tamen nur en la dua vespero atingos la kulminon.

Dimanĉmatene preskaŭ 100 kongresanoj ĉeestas la diservon en « Pepergasthuis », kie pastro J. A. v. d. Meiden predikas pri Marko 16 : 1-9 « Kiu derulos la ŝtonon », kaj poste rapidas al la kongresejo por mire gapi al la scenejo, kie gravmienaj alranguloj, flandro inter nederlandanoj kaj de la aliaj diferencigebla nur pro la fakto ke li trinkas bieron kaj la aliaj kafon, tronas malantaŭ la verda tablo. Plenkuraĵe oni atakas la sufiĉe ampleksan tagordon kaj poste la komunan lunĉon en W.E.E.V.A. Kvankam la vetero ne estas tre favora, pluraj esperantistoj, inter kiuj eĉ kelkaj delegitoj (!), dizertas post la lunĉo kaj ne revenas al « Harmonie », kie s-ino R. Köhler-van Ghelder per sia ĝuiga deklamado kuvaĝigas la ĉeestantojn al digesto de la dua parto de la jarkunveno. Formanĝinte la prokongresan deserton de la komuna festmanĝo la kongresanoj denove kolektiĝas en « Harmonie » por ĝui la teatraĵon « La malgranda eskapado », prezentatan de vere talentplenaj groningenanoj. Post la paŭzo ni ĉeestas idilian scenon en antikva groningena hejmo kaj apoteozon. Por sukcesigi la lastan oni eĉ portempe translokis la Zamenhof-monumenton el Bergen op Zoom al Groningen. Fine sekvas la tradicia balo kun muziko produktata de « Ekstazo » kaj je la dua horo jam ĉiuj profunde dormas escepte de la kasisto, kiu turmentate de financaj inkubsongoj ruliĝas de unu flanko sur la alian kaj de s-ro Wolters... La kongresprogramo ja ne estus komplete, se li ne havus sian aventuron. Kun multe da bruo li falas tra sia lito kaj rezignacie rampas en rezervan liton, kiun la prudenta hotelestro jam antaŭe estis metinta en la ĉamburon por fronti ĉiajn eventualaĵojn.

Lundmatene tri aŭtobusoj transportas la kongresanojn tra la eksteraj kvartaloj de Groningen al Hoogkerk kaj Paterwolde, kie oni trinkas kafon « Clubhuis » kaj aŭskultas prelegon de s-ro J. V. Holleman, kongresa fakdelegito pri torfaj aferoj. Preter Haren la aŭto-

(daŭrigo, p. 2)

OBSERVOJ

LA STUDANTO

Wereldnieuws

«MIRO»



Finfine la Esperanto-mondo havas la organizajon kiun ĝi nepre bezonis : Magia Internacia Rondo, alinome kaj mallonge «Miro».

«Miro» ne estas amasorganizaĵo. Simpla estulo kia vi aŭ mi ne rajtas ĝin eniri. Nur ĵonglistoj, mistifikistoj, magistoj kaj sorĉistoj povus membriĝi.

Tiun esoterismon mi tre bedaŭras. Kaj mi tre petas la estraron de «Miro», ke ĝi larĝe malfermu la pordon, ne al ĉiu esperantisto, sed almenaŭ al la kasistoj de niaj lokaj, landaj kaj tutmondaj organizaĵoj, kiuj tre profite povus utiligi ĝin da sorĉarto por plenigi la kasojn kaj ĝin da ĵonglaro por ekvilibrigi la buĝetojn!

PIK.

TAALVAARDIGHEID.

De intencio de onze Verenigingen voor Vreemdelingenverkeer om buitenlanders voor te lichten en behulpzaam te zijn, is lovenswaardig. Toch schieten ze vaak tekort wat betreft taalvaardigheid. Dat blijkt eens te meer door een bericht in het orgaan van de Deense esperantisten «Dansk Esperanto-Blad»: «De stad Almelo gaf een prospectus uit in vier talen, waaronder Deens en Esperanto. De tekst in Esperanto is goed, maar in de veertig regels Deens komen meer dan veertig fouten voor»...

DE BEUTSCHE EISENBAHN EN ESPERANTO.

De administratie van de Duitse Spoorwegen heeft een speciaal kantoor opgericht met het doel al de vraagstukken te onderzoeken die het gebruik van het Esperanto op de Duitse spoorwegen stelt. In vele scholen voor spoorwegpersoneel worden cursussen in de internationale taal gegeven. In «Der Eisenbahner» verscheen een reeks bijdragen over dit probleem van de hand van Oberreichbahnrat Ernst Schuchmann. Vanaf het Aprilnummer publiceert dit vakblad een schriftelijk Esperantocursus.

Een onderzoek onder het spoorwegpersoneel (meer dan 500.000 personen) heeft uitgewezen dat weinig belangstelling bestaat voor het aanleren van vreemde talen. Daarentegen bestaat er grote belangstelling voor de studie van het Esperanto.

NOG EEN!

«Opstanding» (Antwerpen) meldt dat een geestelijke uit Geses bij Bayreuth een nieuwe wereldtaal heeft ontworpen. Hij noemde ze «Una»; zij omvat 3.000 woorden die een Duitser op twee uur tijd machtig kan worden. Al de 720 overige ontwerpen, verklaarde de geestelijke, zijn spraakkundig vals. Daarom heeft hij de spraakkunst in zijn ontwerp geheel afgeschaft...

Sinds Zamenhof zijn internationale taal aan de wereld schonk was het niet meer moeilijk allerhande taalprojecten samen te stellen. Ze zijn dan ook legio. Maar zo levensvatbaar was het Esperanto, dat al deze projecten geen kans kregen de taal van Zamenhof met enige kans op succes naar het leven te staan. Alleen het Esperanto vindt toepassing in de praktijk. De eeuwige wet der selectie heeft ook op het gebied van de wereldtalen haar werk gedaan. Deze wet is onverbiddelek. Wie iets voelt voor de idee van de internationale taal gaat Esperanto leren, en niet Una of een of ander vaag project dat geen aanhang vindt en bijgevolg geen praktische mogelijkheden biedt.

DE SUPREMATIE VAN HET ESPERANTO.

Toch wekken dergelijke berichten de indruk bij de leek dat op het gebied van de wereldtaal alles nog te doen is en men blijft vorse naar het geschikte project. Dr. W. J. A. Manders in zijn groot werk «Vijf Kunsttalen» heeft een vergelijkend onderzoek ingesteld naar de waarde van het Volapük, het Ido, het Occidental en het Novial. Dit zijn de enige kunsttalen die destijds enige toepassing hebben gevonden buiten het Esperanto dat ze alle overvleugeld heeft. Uit dit streng objectief en wetenschappelijk geheel verantwoord werk blijkt duidelijk de suprematie van het Esperanto, dat synoniem werd van internationale taal.

La 23-a kongreso de «Sennacieca Asocio Tutmonda» (S.A.T.) okazos ĉi-jare 29. VII — 4. VIII en Torino (Italujo). Kongreskotizo por S.A.T.-anoj 1,75 dol.; por ne-anoj 2,25 dol.; post 1-a de majo resp. 2,25 dol. kaj 2,75 dol. Sekr. de la L.K.K. estas s-ro M. Guzzi, Via Modena 33, Torino.

Uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer :

1. Promenante sur la strato mi renkontis kelkajn nerazitajn virojn, nekonalajn de mi (mij onbekend, lett. : niet gekend wordend door mij). 2. Kiu estas la verkinto de tiu romano? 3. Li lasis fali du tasojn; unu el ili montrigis rompiginta; la alia estis nur krevinta. 4. La arbhakisto forbruligis la faligitajn arbojn. 5. La jarkunveno decidis pri la urbo, kie L.E.E.N. kongresos en la venonta jaro. 6. Li klopodis turni la renversigintan boaton. 7. La savito kore dankis sian savinton kaj donacis al li libron, acetitan ĉe la libroservo de L.E.E.N. 8. Ĉu vi estas vizitonta la kongreson de Fl.L.E., okazontan je Pentekosto en Oostende? 9. Mi esperas baldaŭ ricevi la de mi menditajn verkojn. 10. Fiere la sukcesinta kandidato montris al mi la jus ricevitajn diplomon. 11. La ĵugisto severe punis la mortiginton. 12. La bankrotinta komercisto pendigis sin per ŝnuro, farita el papero.

volgens onderstaande vragen met volledige zinnen :

1. Kiun profesion havis s-ro Gibeau? 2. Ĉu li disponis pri multe da mono? 3. Kiom da mono li posedis? 4. Ĉu li estis abstinenculo? 5. Ĉu ĉampano estas multekosta trinkaĵo? 6. Al kiu li skribis leteron? 7. Kiom da boteloj li deziris ricevi? 8. Kion la ĉefo faris, ricevinte lian leteron? 9. Kial li ne sendis ĉampanon? 10. Kial li opiniis la rimedon netaŭga?

Ter vertaling :

1. Wist ik maar, of hij te vertrouwen is! 2. Hoe laat begint ge uw werk? 3. Men wordt verzocht, de wachtkamer op geen enkele wijze te verontreinigen. 4. Eten we gekookte aardappelen? Ik heb ze liever gebakken! 5. Hij vergist zich zelden, maar deze keer heeft hij toch een verkeerde berekening gemaakt. 6. Het lijkt me wenselijk, dat we eerst naar huis gaan en dan verder spreken. 7. Mijn buurman wilde zijn hond verdrinken omdat hij ziek was. Hij gooide hem in het water, maar door te zwemmen bereikte

LIBRO - AMANTOJ!

Ni petas vian atenton por la sekvantaj, antaŭnelonge aperintaj libroj :

- Invito al Ĉielo.* Originala romano de D. Sayers en plaĉa vesto. Ĝi vere forrabas la spiron de la leganto. gld. 6,40 bfr. 85
- Brulanta Sekreto* kaj aliaj rakontoj de Stefan Zweig. Libro memoriginda. gld. 2,25 bfr. 30
- A.B.C.-libro* por junaj infanoj, kun bildoj, versaĵoj, sur dika kartona papero kaj presita kolore. gld. 0,75 bfr. 10
- Interlingvistiko kaj Esperantologio* de Dr. Manders la aŭtoro de la monumenta «Vijf Kunsttalen». gld. 2,25 bfr. 30

Porti voor koper. Bestellingen aan :

Vlaams E.-Instituut, Diepestr. 44, Antwerpen (giro : 3268.51 ; tel. : 244.30)
Boekendienst LEEN, Z.O.-Singel 5, Bergen op Zoom (giro : 76915)

1. La malfermon de la nova fervojo ĉeestis multe da aŭtoritatuloj. 2. Li rapidis (niet : rapidis sin!) hejmen kiam li eksiis, ke lia (nooit «sia» in het onderwerp zelf) edzino subite malsaniĝis. 3. La geonkloj skribis al ni, ke ili baldaŭ venos. 4. Mi pendigis la kalendaron sur la muron. 5. Se mi estus tiel riĉa kiel li, mi acetis fotografilon. 6. Ambaŭ (niet : la ambaŭ) fratoj, kiuj ne vidis unu la alian dum dek jaroj, ĝojis pri sia neatendita renkonto. 7. Antaŭe la prezo de tiu libro estis proksimume tri guldenoj (naamw. deel v. h. gezegde, dus eerste naamval!), sed la prezo nun estas preskaŭ unu guldenon (bep. zonder voorzetsel, dus met n!) pli alta. 8. Ĉi tiu romano estas multe legata. Mi ne ŝatas romanojn; mi preferas studlibron. 9. Tiuj, kiuj partoprenis la ekskurson, multe ĝuis. 10. Hieraŭ pluvis la tutan tagon; kia la vetero estos morgaŭ?

Kaj jen la tradukoj de la taskoj por progresantoj :

Estas al mi indiferece (egale). Li juris (jure deklaris), ke li vidis nenion. Sen depreno de la ordinara kromsalajro li ricevis ankoraŭ ekstran pagon. Konsultu pri tio vian lernolibron. Konvenatempe mi rememorigos vin pri tio. Li estas ĝisosta esperantisto. Tagon post tago li rakontas la samon. Infanoj malpli ol dekjaraj pagas la duonon. Ne miksu vin en tion! Ne tuŝu la spegulon! Tio transpasas ĉiujn limojn. Lia plano fiaskis. Ĵugante laŭ lia eksterajo mi kredas, ke li estas fremdulo. Li estis la antaŭlasta. Ĉiun duan tagon (alterntage) mi renkontas lin.

1. Li kondutis tre strange; bukedon de (da) velkintaj (niet velkita!) rozoj li metis en sitelon, plenan de kafo. 2. Li rakontis al mi, ke la viro, kiun oni pro lia distreco nomas la profesoro (bep. v. gesteldheid) estas (tijd van de dir. rede) lia onklo. 3. Ne mankis multe kaj li maltrafis la vagonaron (apenaŭ li trafis la vagonaron). 4. Vi bonŝancas, trovante min hejme, ĉar mi ĝuste estis elironta, kiam vi sonorigis. 5. Nekonante la lin minacantajn danĝerojn, li nearmita (bep. v. gesteldh.) ekvojaĝis. 6. Tion, kio okazis al li, mi hieraŭ legis en la ĵurnalo.

La verkisto Gibeau, kiu ĉiam estis en mona embaraso, skribis unu fojon al la ĉefo de konata ĉampanfabriko leteron kun la jena enhavo : «Sinjoro! Mi ne havas eĉ unu centimon kaj mi adoras la ĉampanon. Bonvolu sendi al mi korbon da boteloj de via dia trinkaĵo. Kun ĝi mi esperas forgesi mian mizeron». Apenaŭ la ĉefo ricevis tiun leteron, li tuj sendis la sekvantan respondon : «Via rimedo por forgesi vian mizeron, neniel taŭgas. La senĉesa kaj obstina prezentado de nia fakturo rememorigus vin ĉiumomente denove pri via malĝoja situacio.»

Vertaal bovenstaande tekst in zo goed mogelijk Nederlands en beantwoord ver-

het arme dier de andere oever. 8. Hoe ijveriger u gestudeerd hebt, hoe groter de kans is, dat u zult slagen. 9. Zoveel hoofden, zoveel zinnen is een bekend spreekwoord. 10. Hij is bekwaamder dan zijn voorganger. 11. Hoe hard Piet ook liep, Jan bleek de snelste van de twee. 12. Alle mensen verheugden zich, toen eind Februari de vorst ophield en het weer wat minder guur werd.

Por progresantoj :

Traduku :

1. Een goed verstaander heeft maar een half woord nodig. 2. Verzoeken per omgaande te antwoorden. 3. De politie-agent was in burger. 4. Ten onrechte beschuldigde men hem van diefstal. 5. Voor zover ik weet, heeft hij het geheim niet verklapt. 6. De klok loopt tien minuten voor. 7. De zieke kwam langzamerhand weer op krachten. 8. Hij is er op uit om je te bedotten! 9. Handen omhoog! 10. Hij schreeuwde uit alle macht om hulp. 11. Een goed begin is het halve werk. 12. Hij is een man van naam. 13. Voor zijn leeftijd is hij vlug van begrip. 14. Ten einde raad vroeg hij mij om hulp. 15. Nou, daar sta ik van te kijken! 16. Dat is een uitgemaakte zaak. 17. Hij nam de gelegenheid te baat om ongezien te verdwijnen. 18. Van de regen in de drup komen. 19. De vijand gaf zich zonder slag of stoot over. 20. Dat komt ervan! Dat gaf de doorslag.

Een tandarts, die een nieuw gebit, dat hij aan een dame had geleverd, maar niet betaald kon krijgen, schreef haar tenslotte het volgende briefje : «Geachte mevrouw. Wanneer ik niet binnen twee dagen het door U verschuldigde bedrag in mijn bezit heb, zal ik genoodzaakt zijn, de volgende advertentie in enkele grote bladen te plaatsen : «Prachtig nieuw, nog zeer kort gebruikt gebit te koop. Dagelijks te zien bij mevrouw Smit, Hoofdstraat 55, alhier.» Het geld was er dezelfde dag.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten vóór 20 Mei aan V.E.B., Studenton, postbus 342, Brussel; voor Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

ROMANS vin vokas!

Survoje al la U. K. en Parizo aŭ al Mediteraneo, nepre vizitu la Someran Restadejon kiu okazos de la 24-7 gis la 4-8-1950 en Romans. Je 625 km. de Parizo, 100 km. de Lyon, 80 km. de Grenoble, 250 km. de Marseille, Romans, industria urbo kusa meze de nepre vizitindaj regionoj : Alpoj, Centra Montaro, Rodano. Persikoj kaj abrikotoj abundas en la valo.

La Somera Restadejo okazos en la bilda Kastelo, pruntita de Ministerio pri Agrikulturo.

La kosto estos plej malalta kiel eble kaj ne superos 650 fr. por 1 tago.

Informoj : BONA STELO, 31, Rue Pécherie ROMANS (Drôme) Francujo.

Esperanto wordt, zo lezen wij in «Esperantologio» no 1, in het buitenland reeds aan verschillende Hogescholen en Universiteiten gedoceerd, o.a. in Giessen ana de Justus Liebig-Hogeschool; in Krakau aan de Jagiellonski-Universiteit; aan de universiteiten in Liverpool en Lods; in Mainz aan de J. Gutenberg-Universiteit; in Munchen aan de Ludwig Maximilian-Universiteit en de Technische Hogeschool; in Praag aan de Technische Hogeschool; aan de universiteit in Szeged en aan de Landbouwhogeschool de Handelshogeschool en de Technische Hogeschool te Wenen. Bovendien worden speciale cursussen gegeven voor studenten in Bratislava, Havanna, Santiago, Toronto, Varna en Florida.

De staat Minos Gerais (Brazilië) stelde het vorige jaar een subsidie van 30.000 kr. beschikbaar voor het nationale Esperanto-congres in Belo Horizonte, terwijl deze stad zelf een gelijk bedrag voor dat doel beschikbaar stelde. De spoorwegen verleenden de congresbezoeker een reductie van 65 %.

In Hamburg slaagden 24 politiebambten voor het staatsdiploma en dragen nu in dienst de Esperanto-ster. Vanaf Jan. 1950 wordt aan 40 onderwijzers en 1000 leerlingen Esperanto-ondericht gegeven.

Aan de school voor tolken te Gengenbach (Baden) is Esperanto verplicht leervak.

De Finse astronoom dr. Y. Väisälä heeft aan twee door hem ontdekte kleine planeten de namen «Esperanto» en «Zamenhof» gegeven.

Het N.V.V. is in 1949 begonnen zijn internationaal informatief bulletin ook in het Esperanto te laten verschijnen. De tot nu toe verschenen nummers bevatten o.a. verslagen over werkzaamheden, congres, organisatie en de Stichting van de Arbeid.

Het Slowaakse Bureau voor Voorlichting en Onderwijs geeft een gratis maandelijks orgaan «Kultura Revuo» uit, dat artikelen bevat over het Slowaakse culturele leven.

In de 270 blz. tellende «Anales de Instruccion Primaria», uitgave van de Nationale Raad voor Lager- en Kweek-school-onderwijs te Uruguay, vonden we een artikel van 40 pag. van M. Fernández Menéndez «De opvoedkundige waarde van het Esperanto».

In het Blindeninstituut te Trondheim (Noorwegen) wordt Esperanto als verplicht leervak onderwezen.

In de afgelopen maanden zijn weer verschillende gidsjes en vouwblaadjes in het Esperanto verschenen o.a. van Tiroi en de Passie spelen te Oberammergau.

De vergadering van de Ned. Chem. Veren. heeft toestemming verleend tot het opnemen van Esperanto-resumé's in «Chemisch Weekblad» en «Recueil des travaux chimiques neerlandais».

Het gemeentebestuur van Hoogezand (Ned.) heeft besloten een subsidie van f. 40,— toe te kennen aan de plaatselijke afdeling van «La Estonto Estas Nia».

Meer en meer wordt, ook in ons land, voor toerisme enz. gebruik gemaakt van Esperanto. Zo verschenen o.a. een vierdelig vouwblad «Almelo, pleisterplaats voor Twente», waarin Esperanto een ereplaats inneemt (uitgave Verkeershuis, Grote str. 80 Almelo), «Kiu ne konas Groningen, ne konas Nederlanden», (geill. vouwblaadje van de V.V.V. te Groningen), en geïllustreerde prospecti van Karlovy Vary en Bratislava, verkrijgbaar resp. bij Centra Prop. kaj Informa Officejo Stara Louka 4 Karlovy Vary Osl. en Slavakotour, Reduta Bratislava Osl., en van de Deense stad Koge (Turistforeningen Koge, Denemarken).

KONGRESAJ IMPRESOJ

(daŭrigo p. 1.)

busoj rekondukas la kongresanojn al W.E.E.V.A. kaj ĝuste en la momento kiam ĉiuj kolektigas por enbuŝigi la adiaŭan lunĉon, la pluvo ekfalis torrente. Je la tria kaj duono s-ro H. J. Blokker fermas la kongreson, dankante la L.K.K. pro la bonaj aranĝoj. Multaj ankoraŭ partoprenas la postkongreson, kiu okazas en la stacidoma atendejo. «Jen la vagonaro, do dankon, groningenanoj, dankon pro ĉio kaj adiaŭ! Ĉis revido en...? Jes, kie ni kongresos en 1951? Jen eble la sola problemo, ne solvita en la jarkunveno!»

Pri la kongreso raportis i.a. «Nieuwsblad van het Noorden» (11-4-'50), «Oms Noorden» (12-4-'50) kaj detale kun foto pri la oficiala akcepto «Het Vrije Volk» (11-4-'50).

Honorigo de S-ino L. Baas-Kroef

Laŭ deziro de la LEEN-delegitaro, en la jarkunveno, la honoriga komitato sendis al S-ino Baas ornampoton kun belaj floroj. Pro tio ni ricevis dankleteron de la honoritino kun la peto transdoni ŝian dankon al la LEEN-anaro. Per ĉi-tiu ni volonte plenumas la deziron de la edzino de nia nelacigebla eksprezidanto s-ro Baas.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst :
 Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.
 Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.
 Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
 Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Flandra Ligo Esperantista kaj LEEN arangos Beneluksan aŭtobuskaravanon al la feriaj kursoj en Helsingör (Danlando). L.E.E.N.-anoj, kiuj deziras partopreni, turnu sin al s-ro P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.

Tiuj, kiuj karavane (aŭtobuse aŭ vagonare) deziras vojaĝi al la Pariza kongreso, petu informojn de s-ro H. Bakker, van Tuyl v. Serooskerkenplein 33, I, Amsterdam-Z.

La abonantoj de «Nederlanda Esperantisto», kiuj ankoraŭ ne pagis la abonsumon por la jaro 1950, bonvolu ĝirpagi g. 2,25 per postkonto 34563 de Ned. Esp.Ver. L.E.E.N., Amsterdam.

La ĉefestraro de L.E.E.N. nun konsistas el jenaj personoj : s-ro H. J. Blokker, prezidanto ; s-ro mag. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam, sekretario ; s-ro P. M. Mabesoone, kasisto ; f-ino S. Visser, s-ro W. Böttcher, s-ro F. Weeke kaj s-ro C. B. Zondervan.

N.C.K.E.

En sia unua kunveno en 1950 «Nederlanda Centra Komitato Esperantista» decidis starigi komunan radio-servon. La gvidanto, s-ro S. S. de Jong regule sendos komunikojn por rubriko «Verdlando Vokas» al la redaktoroj de la asociaj organoj.

Krome N.C.K.E. decidis kolekti la adresojn de parolantoj, kiuj pretas prelegi en kunvenoj de kunlaborantaj lokaj sekcioj kontraŭ repago de la vojaĝelspezoj.

Jam en diversaj lokoj la sekcioj de L.E.E.N., F.L.E., N.K. kaj K.U. N.E. kunlaboras en lokaj kunlaborkomitatoj. Ĉar tiaj komitatoj povos ebligi pli efikan kunlaboron inter N.C.K.E. kaj la lokaj sekcioj kaj multe kontribui al la efektiviĝo de la laborprogramo de N.C.K.E., ni forte rekomendas al sekcioj en lokoj, kie ĝis nun oni ne starigis tian kunlaborkomitaton, fari tion kiel eble plej baldaŭ. La lokaj kunlaborkomitatoj bonvolu sciigi sian adreson al la sekr. de N.C.K.E. s-ro J. Pouli, Elegaststraat 19 hs, Amsterdam-W.

Speciala cirkulero, aldonita al ĉi tiu numero informas la legantojn pri monkollekto por la oficejo «Esperanto ĉe la Instruado», kiu ĉisomera aranĝos specialajn Esp.kursojn por ĝeinstruistoj.

RAPORTO PRI LA JARKUNVENO

1. Kiam s-ro P. W. Baas precize je la 10.30 h. malfermas la kunvenon, li povas saluti krom multajn sekciajn kaj ĝeneralajn anojn kaj kelkajn eksterlandajn gastojn la delegitojn de ĉiuj sekcioj, escepte de Amersfoort, Bergen, Bozum, Breda, Culemborg, Edam, Heerenveen kaj Vlissingen. La estraroj de Bozum, Culemborg, Edam kaj Vlissingen eĉ ne opiniis necese respondi al nia peto, reprezentigi sin en la jarkunveno. Rememoriginte per kelkaj vortoj niajn mortintajn anojn kaj parolinte kelkajn dankvortojn al la adreso de s-ro P. Heilker, kiu rezignis pri ĉiuj funkcioj en la Esp.-movado, la prezidanto skizas la nunan enlandan situacion, kiun li opinias nekontentiga ĉefe pro la fakto, ke pluraj izolaj esperantistoj ĝis nun ne aliĝis al iu el la landaj asocioj, sed parazite profitas de la laboro kaj oferemo de la organizitaj esperantistoj, sen kiuj ne ekzistus gazetoj, Esp. libroj, efika propagando kaj kongresoj. Li rememorigas la klopodojn de L.E.E.N. starigi pli firmajn kontakton inter la landaj asocioj, kio ne donis pozitivan rezultaton tamen li ĝojas pro la kunlaboro en N.C.K.E., la ekzamena komitato kaj la oficejo. Ĉar la sinteno de T.J.O. malebligis kunlaboron kun ĝi, ni mem devos solvi la junularan problemon, kiu tiom pli urĝas, ĉar en diversaj mezgradaj lernejoj kaj seminarioj oni nun komencis instrui Esperanton. L.E.E.N. bezonas

junan freŝan sangon ; la farto de pluraj sekcioj lasas multon por deziri kaj la ĉefestraro esploru la eblon plifirmigi la kontakton inter la sekcioj kaj la ĉefestraro.

3. La sekretario voĉlegas salutleterojn kaj telegramojn de s-ro H. A. Appel, s-ino A. M. v. d. Wal-Brethouwer, s-ro T. Jung, s-ro S. K. Nielsen, s-ro J. Starke (K.U.N.E.), s-ro J. Hanenburg (Gron. Studenta Esp. Rondo) kaj s-ro G. Bekering kaj faras kelkajn komunikojn.

4. Asocia jarraporto 1949 (N.E. 2,3). S-ro H. Arends demandas, kial ne aperis en la raporto informoj pri la radio-servo, starigita de N.C.K.E. kaj pri la agado de la lokaj kunlaborkomitatoj. La sekr. respondas, ke tio fakte apartenas al la jarraporto 1950. En la aprila numero de N.E. jam aperis la unuaj komunikoj de la radio-servo kaj en la maja numero aperos alvoko al la lokaj sekcioj, fondi lokajn kunlaborkomitatojn. La raporto estas aprobata.

5 a, b, c. La jarraportoj de la bibliotekisto, de la gvidanto de la propaganda servo kaj de la gvidanto de la teatra servo estas aprobataj. La kunveno decidis, ke la bibliotekisto utiligu la profitan saldon por pliriĝigi la bibliotekon.

6. Pri la financa jarraporto (N.E. 3) neniu petas la parolon. Tio mirigas la ĝen. kasiston, ĉar troviĝas preseraro en la raporto. Li speciale atentigas la jarkunvenon pri la konstato de la kaskontrola komisiono, ke la ĉefestraro funkciiis kiel eble plej ekonomie. Laŭ peto de s-ro Burger la kunveno per aplaŭdo rekomencas la sparemado de la ĉefestraro. La jarraporto de la ĝen. kasisto kaj la raporto de la kaskontrola komisiono estas aprobataj.

S-ro C. B. Zondervan faras kelkajn komunikojn pri la someraj kursoj en «Oolgaardthuis» kaj rekomendas baldaŭan aliĝon.

7a. Kritiko pri la gvidado de la ĉefestraro. S-ro Arends demandas, ĉu ne estas eble aranĝi prelegservon en la kadro de N.S.K.E. La sekr. respondas, ke en la unua ĉi-jara kunveno de N.C.K.E. oni jam priparolis tiun aferon. S-ro Arends demandas, ĉu ne estas eble, aperi raportojn pri la ĉefestrarkunvenoj en N.E. La sekr. pretas kompili koncizajn raportojn por N.E.

7b. Kritiko pri la redaktado de N.E. S-ro J. V. Holleman petas la redaktoron resendi la alsenditajn manuskriptojn al la aŭtoro, se ŝanĝoj montriĝas necesaj aŭ, se la tempo mankas, informi la aŭtoron pri la faritaj ŝanĝoj. La red. pretas fari tion. S-ro Burger demandas, ĉu ne estas eble malplilongigi la tempon inter la limdato por ensendo de la manuskriptoj kaj la aperdato de la gazeto. La red. klarigas, kial la meza daŭro estas proks. du semajnoj. La preŝisto tamen kelkfoje multe tro malrapide laboris kaj tio estis por la ĉefestraro kaŭzo, por serĉi alian presiston. Laŭ s-ro Burger «La Studento» okupas tro multe da spaco. La red. respondas, ke ĝuste tiu rubriko tre plaĉas al multaj sekcioj kaj studemuloj, sed volonte li estonte mallongigos ĝin. S-ro Burger demandas, ĉu ne estas eble plurfoje enpresigi artikolojn kia «Psikotekniko». La red. respondas, ke se li ricevas interesajn artikolojn de tiu speco kaj se la disponebla spaco permesas tion, li volonte de tempo al tempo enpresigos tiajn artikolojn.

8. Ĉar la ĉefdelegito de U.E.A., s-ro P. Moen, pro malsano ne povas ĉeesti, lia edzino voĉlegas la jarraporton pri 1949. (Ni ne ricevis la raporton por nia protokolo). S-ro F. Weeke, komitatano de U.E.A., raportas pri kelkaj organizaj aferoj, ia. pri la neŭtraleco de U.E.A.

15. S-ro Baas proponas antaŭe pri-trakti punkton 15 de la tagordo. La jarkunveno aprobas tion. S-ro E. de Wolf klarigas la proponon de sekcio Haarlem kaj deziras trasteke en la propono la jarnombro 1951. Post kelka diskutado pri la malfacilaĵoj kiujn kaŭzos aranĝo de U.E.K. en Nederlando (salono, gastigo, programo, financaj konsekvencoj, k.t.p.) la jarkunveno akceptas la proponon de sekcio Haarlem sen forstreko de la jarnombro 1951.

(daŭrigota)

SOMERAJ KURSOJ 1950

Denove ni atentigas niajn legantojn, kaj speciale la flandrojn, pri la someraj kursoj, organizataj de L.E.E.N. kaj Fl. L.E. 27 julio - 3 aŭgusto en «Oolgaardthuis», Arnheim (Nederlando). Kursgvidos s-ino A. M. v. d. Wal-Brethouwer, s-ro d-ro Th. v. Gindertaalen, s-ro A. Weide kaj s-ro C. B. Zondervan. La kotizo (g. 36,—) inkluzivas la restadon

RAPORTO 1949 de F.L.E.

La antaŭa jarraporto komenciĝis per ĝoja elkrijo : estas facile raportiti pri elstaraj okazaĵoj. Ĉar vere, dum 1948, multaj gravaj decidoj plifirmigis la deziron de ni ĉiuj : al forta, granda, ideala ligo !

La jaro 1949 estis malpli markita per tiaj eventoj sed ĝi faris la plej grandan paŝon antaŭen rilate la membronombron. La kialoj ? Certe la karavanvojaĝo al Helsingör altiris multajn «unuajrajn» liganon, precipe familiajn membrojn sed, ĉefe, nur malmultaj liganoj forlasis niajn vicajn. Entute nia ligo kunigis 398 gemembrojn laŭ jenaj kategorioj :

Subtenantaj membroj	18
Membroj	319
Familiaj membroj	61
	398

Rimarkinde estas la kresko de la familiaj membroj :

1947 : 28	1948 : 38	1949 : 61
-----------	-----------	-----------

La estraro de F.L.L.E. konsideras tiujn aferojn kiel pozitivan rezultaton de la ligaj agoj kaj la komenco de interesiĝo de la flandra Esperantistaro.

Paralele al la membro-kresko, ni citas la starigon de du novaj sekcioj ; *Leuven*, kaj *Izegem*.

La ĵasinta jaro estis ankaŭ la unua de la beneluksa Esperanto-kunlaborado. Nijaj gemembroj spertis ĝis nun vere tro malmulte de ĝi. Krom la L.E.E.N. rubriko en Flandra Esperantisto kaj la Sommerkurso en Kerk-Avezaath, al kiu cetero nur du liganoj partoprenis, nur aludoj memorigas de tempo al tempo pri la ekzistado de kontrakto kaj de la forte kunlaborema volo de ambaŭ estraroj.

A. Mi unue pri-traktos la sekciojn de la ligo, ĉerpante el la komunikoj kiujn ni ricevis de ili.

1. Sekcio Antwerpen :

Prezidanto : J. Jacobs ; *Sekretariino* : F-ino Hofkens, Gummarusstraat, 21. En F.E. aperis 7 komunikoj.

Kelkaj interesaj kunvenoj okazis, kun prelegoj aŭ varia programo. La filmo el Danujo estis prezentita. En fenestro, ekspozicio pri Esperanto estis aranĝita, celante la organizon de vintra kurso. La membro-nombro malpliĝis. La morto de la Antverpena pioniro, S-ro Van As, iĝis granda perdo por la sekcio kies kasisto li estis dum longa tempo.

2. Sekcio Blankenberge :

Prezidanto : Dro Couwenberg F. *Sekretario* : A. Marmenout, Malecotstraat, 24. En F.E. aperis 2 komunikoj.

Ankaŭ tie oni aranĝis mondro-fenestron por propagandi vintro-kurson. Kunvenoj okazis ĉiusemajne. La membro-manko malkreskis kompare al 1948.

3. Sekcio Brugge :

Prezidanto : Drs Roose F. *Sekretario* : R. Iserentant, Stwg op Blankenberge, 72. En F.E. aperis 5 komunikoj.

Ankoraŭ nun la plej laborema sekcio de nia Ligo. Ĝi okazigas ĉiusemajnajn laborkunvenojn ; krom la organizadon de du Esperanto-kursoj (vintra kaj somera), ĝi aranĝis standon en la Bruga komerca foiro kaj kontribuis grandparte al la sukceso de la Genta Kongreso. De la varbokonkurso Bruĝo ĉi-foje forkaptis ne la unuan premion, jes la duan. En Bruĝo kaj ĉirkaŭaĵoj la membro-nombro konsiderinde kreskis.

4. Sekcio Brussel :

Prezidanto : Cortvriendt E. *Sekretario* : A. Sutterman, Opzichterstraat, 87. En F.E. aperis 6 komunikoj.

La esperantistaro de Bruselo bone kunlaboras kun la Mehlena grupo kaj la Antverpena sekcio. Ofte, propagandaj kaj amuzaj vesperoj okazas, kune aranĝitaj.

Vintra kurso estis organizita sub la aŭspicio de la kultura societo «Hoger op» de la poŝtekoŝicejo. La Bruselanoj okupas la trian lokon en la varbo-konkurso. La anaro de F.L.L.E. tial ege kreskis en la ĉefurbo.

5. Sekcio Gent :

Prezidanto : Vanneste V. *Sekretario* : A. Van de Velde, Buffelstraat, 3. En F.E. aperis 6 komunikoj.

Gent : la urbo de nia kongreso 1949 — ĉiuj kongresanoj kontentaj hejmeniris. La unua glumarko estis presita tiu-okaze. Tre bona organizado. Ankaŭ en tiu urbo la sekcio tre regule kunvenas

ĉiusemajne. Post la kongreso oni koncentrigis ĉiujn propagandojn je la loka radio-stacio, kiu fine, okaze de la Zamenhoftago, elsendis la propagandcele verkitan teatraĵon de P. Varens: *Het rijden van de groene ster*. Nijaj verdstelanoj de Gent certe daŭre eluzos tiun propagandilon. Ankaŭ en Gent la grupo, pligrandiĝis, kaj vintro-kurso komenciĝis ; tio estas plej bona indikilo pri ĝia vicleco.

6. Sekcio Izegem :

Prezidanto : F-ino Agnès Vandoorne. *Sekretario* : Vansteenkiste Gilbert, Kousterweg, 101, Emelegem.

La 21.12.1949, je la sojlo de la nova jaro, formiĝis nova sekcio. 7 junaj Esperantistoj el tiu industria urbeto riskis la grandan paŝon. Komprenibile ke ne eblas multe raportiti pri iliaj agoj dum 1949. Ni esperu ke por 1950 ni disponos longan liston de ĉiusemajn okazaĵoj.

7. Sekcio Leuven :

Prezidanto : Boving H. *Sekretario* : F. Neefs, Broekstraat, 63.

Ankaŭ nova sekcio, akceptita la 1.10.1949. Grupiĝas proksimume 20 esperantistoj. La estraro konsistas parte el veteranoj, parte el novbakitaj esperantistoj. Ankaŭ ili ne jam aktive partoprenis la ligan aktivecon fine de la jaro, sed la fondiĝo de bona forta grupo ne okazas en kelkaj semajnoj.

8. Sekcio Mechelen :

Prezidanto : Vercammen. *Sekretariino* : F-ino M. Buts, Battelsesteenweg, 322, En F.E. aperis 7 komunikoj.

La Mehlena grupo gajnis la varbo-konkurson 1949. Komprenibile ke la nombro de la anoj saltegis supren, nome de 18 al 43. Ili organizis, kune kun la najbaroj grupoj, Antwerpen kaj Bruselo, la Helsingör-karavanon. Krom tio, oni ĉiusemajne kunvenas, kaj faris ekskursojn, i.a. al Hofstade kaj Brugge. La urbo okazigis por la tria fojo senpagan Esperanto-kurson.

9. Sekcio Oostende :

Prezidanto : D'Haenens E. *Sekretario* : Vantourhout W. Christinastraat, 57. En F.E. aperis 5 komunikoj.

La sola grupo kiu eldonas multobligitan grupan buletenon. La agado en ligan kadro tamen ne floradas, ĉar ekz. la membronombro stagnas. Akceptis la organizadon de nia 15-a kongreso. Regule kunvenas. Ekskursis al Francujo kaj Nederlando. Okazas vintra-kurso laŭ la Ĉseh-metodo.

B. LA REPRESENTANTOJ.

Tri pioniroj aldoniĝis al la listo, *Jabbeke*, *Sijsele*, *Welle*. Neniu reprezentanto sukcesis ĉi-jare fondi grupon, krom S-ro Piot el Leuven, dank' al kiu starigis la Lovena sekcio. Aliflanke, la reprezentanto en Rumbek, helpis al la starigo de la sekcio Izegem, kaj li certigis ke dum 1950 li starigos same grupon en Roeselare. S-ro Van Leuven gajnis ankaŭ la individuajn premiojn por la varbo-konkurso, kaj faris la senpagan vojaĝon al Kerk-Avezaath. Ĉirkaŭ la reprezentantoj en Aalst, Ronse, Turnhout kaj Kortrijk, ekestis kernoj, el kiu eble naskiĝos sekcio. Neniam ni tro instigas al grupa fondiĝo, ĉar evoluo daŭras ofte longtempe, sed poste, la stabileco estas despli certa.

C. FLANDRA ESPERANTISTO.

La regula aperado estas certigita pro la kunlaborado de L.E.E.N. Ni konstatis ke la bonaj artikoloj el la plumo de niaj geliganoj kiuj dum 1948 tiel alsendis, malpliĝis. Tial, F.E. ricevis pli «Nederlandan» karakteron. Dankon ni multe ŝuldas al nia ĉefredaktoro Dro Van Gindertaalen, pro sia lerta gvidado. Fine de la jaro ekestis malfacilaĵoj pro la malplivalorigo de la nederlanda guldeno, sed ambaŭ estraroj sufiĉe kontentige solvis la problemojn.

D. LA GAZETAR-SERVO.

Ĝi daŭrigis dum la tuta jaro la publikigon de propagandaj artikoloj en la nederlandlingvaj ĵurnaloj. De tia agado profitis ĉiuj esperantistoj, senescepte, ĉar nur malofte ni menciis la fonto de la novaĵo.

E. LA EKSPOZICIA-SERVO.

Ni ŝuldas al ĝi la libro-standon en Gent, kaj dum la ĝenerala jarkunveno en Bruselo. Cetero ĝi helpis divers-okaze pruntedonante librojn kaj propagandilojn.

F. AMIKO-VARBADO.

Dum 1949, 387 simpatiantoj fariĝis amiko (1948 : 556).

G. SEKRETARIEJO.

Pli ol 700 poŝtaĵoj estis dissenditaj dum 1949. La sekretario vizitis la sekciojn Gent kaj Oostende kaj la reprezentanton en Rumbek.

H. KUNVENOJ.

Okazis du ĝeneralaj ligkunvenoj (Gent kaj Bruselo) kaj 4 estrar-kunvenoj (3 en Gent kaj 1 en Bruselo).

KONKLUDO.

Dum nia ĝenerala ligkunveno de 6.11.49 eksiĝis Dro Van Gindertaalen, Prezidanto deponit 1939, kaj elektigis S-ro De Brouwer kiel nova ligan kapo. Ni esperas ke sub la nova gvidado, nia ligo baldaŭ atingos sian kulminon.

dum la tuta kurso, ĉiujn mangojn kaj ekskursojn. Vespere okazos diversaj prelegoj, k.t.p. Kunlaboros i.a. s-ino R. Köhler-van Ghelder, s-ro d-ro W. Manders kaj f-ino A. D. Tusveld. La duonon de la kurskotizo (g. 18,—) oni pagu tuj ĉe aliĝo per poŝtĝirkonto 70215 de «Administrateur Zomer-Cursus L.E.E.N., Sweelinckstraat 2, Deventer ; la reston tuj post alveno en la konferencio. Okazos diversaj kursoj por komencintoj kaj progresantoj. Se vi volas profiti la okazon pasigi agrablan kaj malmultekostan ferion en Esperantujo meze de internacia rondó de samideanoj, vi senprokraste petu alsendon de la detala senpaga prospekto, enhavanta ĉiujn deziratajn informojn de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

Akiras PREMION post n-roj 81-82 : F-ino Van Mullem (81 p.) el *Blankenberge* por VEB; kaj por LEEN : F-ino E. Leopold el *Arnhem*.

SOLVOJ.

N-ro 83. *Horiz.* 1. patos; alkov. 2. estraran. 3. parti; amuzo. 4. novbakit. 5. kri; ul; orf. 6. folium. 7. virgulin. 8. tre; al; ebl. 9. nekrolog. 10. detru; aprob. 11. epifanio. 12. satir; gajno.

Vert. 1. pup; krut; dis. 3. terni; ventet. 4. osto; fi; erpi. 5. stiv; or; cuir. 6. bulgar. 7. aliulo. 8. arak; ul; lang. 9. lami; mi; opia. 10. knuto; negroj. 12. veo; fajl; buo.

N-ro 84. ofico; forumo; tendaro; ekspliki; ekstari; sinamo; tragika; alvoko; senpova; pomado; lernejo; inkubo; bonkora; orgeno; nutrajo; arkajo; jurrompi. Ofte estas plibonaĵo malamiko de bonajo.

N-ro 85 : KRUKVORTENIGMO.

Horizontale. 1. batado de la arterioj (R); speco de nukso (R). 2. ludkarto (R); nombro. 3. venke rebati opinion per trafaj argumentoj (R); solvi substancan en fluajo, ĝis ĉi tiu ne povas solvi pli (R). 4. glitilo (R); malsano (R); prefikso. 5. korpe batali (R); malhumile postuli (R). 6. rifuĝejo (R); oficiala dokumento. 7. sekve; ĉiela korpo (R); besto (R). 8. jara profito pro prunte-donita mono (R); tempospaco (R). 9. birdo (R); ĉefo (R); konjunktejo. 10. granda ardo da domoj; konfuzata de alkoholo aŭ emocio (R). 11. tie oni mon-

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11

1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

tras objektojn koncernantajn historion, folkloron, ktp. (R); li konstante migras (R).

Vertikale. 1. sukcesi kredigi ion al iu (R); provizi per bataliloj (R). 2. komenciĝi (R); okupi sin pri io, por certigi ties bonan staton (R). 3. firmo dependa de alia ĉefa firmo (R); difekti per longa uzado (R). 4. rapide kaj ripete moveti tien kaj reen (R); soldato (R); prefikso. 5. ekbatali (R); maŝinkudrie (R). 6. kolekto (R); situacio (R); aŭdebla vibrado (R). 7. korp parto de besto (R); skribilo (R). 8. karulo (R); apliki forton sur iun korpon, por malvastigi la spacon okupitan de ĝi (R). 9. kunfiksi du metalajn pecojn (R); ŝtonego; interjekcio. 10. ĝi ŝvebas en la aero; sameco de sentoj inter pluraj personoj (R). 11. anstataŭa produkto (R); persona pronomo.

N-ro 86 : ANSTATUAIGU

unu literon en ĉiu el la subaj vortoj, por formi novajn vortojn laŭ la aldonitaj signifoj. La anstataŭigitaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, fariĝos Zamenhofa proverbo.

1. teatro : fajraĵo. 2. romano : pagilo. 3. ridegi : aspiri posedon de io. 4. leporo: rimedo. 5. tulipo : ĝi estas en la okulo. 6. gitaro : viandmanganta birdo. 7. figuro : malakcepto. 8. somero : kuracilo. 9. nevino : alteco de iu punkto rilate al horizontala ebena. 10. stablo : teatra danco. 11. teraso : skeleto. 12. kverko : guto da iu fluajo. 13. vagulo : apudmara neprofunda etendaĵo da akvo. 14. barelo : rifuzo obei al aŭtoritato. 15. spliti : ŝipgvidi. 16. pastro : batalo inter ludantoj. 17. venigi : moveti ripete kaj rapide. 18. deveno : substanco, malutila al la funkcioj de la vivo. 19. kanono : persono kun kiu ni havas rilatojn. 20. esperi : elstari super iu alia. 21. skalpo : trinkvazo. 22. fariĝi : besto. 23. skermi : fekundigi teron. 24. striko : parto de pano. 25. nobelo : sur ĝi oni ĉirkaŭvolvas fadenon. 26. anemio : malklara afero. 27. fusilo : efiko al iu.

La solvojn sendu la nederlandanoj al *S-ro Teunissen*, Burg, Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam Zuid, kaj Flandra Ligo al *Postbus 342 (Enigmoj)*, Brussel, antaŭ la 20.5.1950.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — Afdeling Antwerpen. Op 25-3 j. hielden wij ons bal dat een waar succes werd. Er werd tot 4 u. 's morgens gedanst; Mevr. L. Berna gekend vanuit het radiostation Brussel en de Antwerpse zanger Delmaere brachten verscheidene aantrekkelijke nummers ten gehore. Vanaf a.s. maand zullen wij 's Maandags vergaderen en niet meer 's Woensdags. Programma Mei als volgt: 8-5 : afwisselend programma; 15-5 : spraakleer; 22-5 : zangavond; 29-5 : voordracht door Mr. Van Gindertaelen « Alice Nahon en haar gedichten ».

V.E.B. — Afdeling Brugge. De voorbereiding en herhaling van en voor ons uit te voeren programma op het congres te Oostende eisen al onze aandacht. Gevolgd daarvan slechts de gewone punten bij de wekelijkse vergaderingen. Iedere Zondag evenwel komen de meeste leden samen voor een genoeglijke namiddag sport en spel.

V.E.B. — Afdeling Brussel. In Maart en April vonden enige wijzigingen plaats in onze afdeling. Eerst de verandering van lokaal; we huizen nu in « Le Brassieur », Boterstr., Brussel (in de drie B's!) Anderzijds verliet onze Voorzitter ons om te Antwerpen afdelingssecr. te worden: het geldt amiko E. Cortvriendt... Het nieuw bestuur : Voorz., Maurice Van Hove; penningmeesteres, Mej. J. Kempen; secretaris, A. Sutterman.

V.E.B. — Afdeling Mechelen. Ons April programma werd regelmatig afgewikkeld. Ons programma Mei : 3-5 : besprekingen over Congressen en reizen; 10-5 : enigmo; 17-5 : varia programo; 24-5 : zangavond; 31-5 : grammatikale spreekbeurt. Verder, iedere Woensdag, behandelning van « La forto de l'Ve-ro ».

Intersekcia Kontakto (LEEN).

En Marto grupo da Hilversumanoj ĉeestis klubkunveno de sekcio Amsterdam. Detala raporto pri tio superfluas, ĉar la intenco de pluraj Amsterdamanoj viziti festkunveno okazontan, la 17an de Majo en Hilversum, montras ke la intersekcia kontakto estas ŝatata. Multaj iru la 17an al « Ons Gebouw » Havenstraat por ĝui tie agrablajn vesperon.

VERTALEN IS OOK MOEILIK

Onder deze titel lazen wij in « De Auto », het orgaan van de Kon. Nederlandse Automobiel Club, het volgende : « Wij lazen « De Knalpot », maandblad der Autotechnische Schoolvereniging te Apeldoorn, en troffen daarin een bloemlezing aan van vertalingen, die ons even terugbrachten naar de jaren toen wij zelf een collar bone voor een hoor-denknopje uitmaakten. De in « De Knalpot » geciteerde vertalers wisten er echter ook raad mee : « Der Monteur schlug die Sicherungsmutter kaput » kon volgens de een of andere, aan beeldromans ten onder gaande leerling, niets meer of minder betekenen dan : « De monteur sloeg die zekere moeder dood »!

« He did not even know, how to repair the rear brakes. » — « Even wist hij niet, hoe de rare remmen te repareren », luidde dit in, wel wat al te vrije vertaling.

En wat denkt U hiervan ? « Das Polster war ganz schmutzig » — « De poolster was erg smerig »! Wij denken alleen maar, dat degen die deze vertaling ten beste gaf alle hemellichamen over één kam schoor en daarbij in de eerste plaats aan onze wereld dacht. En in dat verband is het nog zo vreemd niet.

Ten slotte nog centje, die met de automobielterminologie weinig heeft te maken, maar die te aardig is om u te ont-houden.

Een meisje wist niet beter te doen dan het zinnetje « Wir baten den Lehrer etwas » te vertalen door : « Wij baadden de leraar een beetje ». Wij hebben hier Freud eens op nageslagen.

Tot zover dit bericht. In onze gedachten schoot ons nog een voorval te binnen. Op een examen enige jaren geleden, werd het zinnetje « Je ne suis pas marié » vertaald door : « Ik ben geen marinier ».

Zeker zullen er altijd kandidaten op examens blijven, die wonderlijke vertalingen zullen ten beste geven. Maar hoe kleiner het aantal te leren talen, hoe groter de kans, dat men hen beter leert en derhalve hoe minder mogelijkheid, dat men over vertalingen zijn hals breekt. Een internationale taal! Ook tot heil van examinandi en examinatoren! En vanzelfsprekend het gemakkelijk te leren Esperanto!

bibliografio

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO de d-ro W. Manders, eld. J. Muusses, Purmerend.

D-ro W. Manders, kiu pro sia ampleksa disertacio « Vijf Kunsttalen » (= Kvin Artlingvoj) kaj siaj prilingvaj artikoloj kaj prelegoj jam akiris certan famon ankaŭ ekster niaj landlimoj, ĉi-foje verkis koncizan libron tute en Esperanto, destinitan ne por ŝovinismaj samldeanoj sed por tiuj esperantistoj kiuj deziras pli profunde penetri en la teoriajn principojn de la esperantismo kaj de la planlingva movado ĝenerale. En la unua parto (Interlingvistiko) d-ro Manders i.a. konstatas, ke Jespersen kaj preskaŭ ĉiuj interlingvistoj ne sufiĉe atentis la praktikan aplikon de Esperanto kvankam ĝusta esploro de la praktika apliko ebligus al ili ekzameni la pravecon de la kritiko kontraŭ Esperanto aŭ konkludi ties senbazecon. En du postaj ĉapitroj d-ro Manders pritraktas la naturalismon de E. de Wahl, O. Jespersen kaj I.A.L.A. kaj prezentas tekstojn en Occidental, Novial kaj la diversaj I.A.L.A.-projektoj kun tradukoj en Esperanto. En la dua parto la aŭtoro i.a. pritraktas la taskojn de la esperantologio, ekzamenas la normojn, kiujn oni kutimas apliki por juĝi pri lingva korekto kaj refutas i.a. la oftan kaj eraran diradon ke « Esperanto evoluas libere same kiel la naciaj lingvoj ». Ĉapitro pri kompara esperantologio kun detala pritrakto de kelkaj prepozicioj kompletigas la verkon. Per la aperigo de « Interlingvistiko kaj Esperantologio » s-ro Muusses faris gravan servon al la seriozaj esperantistoj, kiuj tamen ofte ne sufiĉe interesigis pri interlingvistikaj teorioj kaj sekve de tio ne povas sukcese rebati kritikojn kaj argumentojn de seriozaj kontraŭuloj kaj lingvistoj. Espereble ĉi tiu nova verko de d-ro Manders trovos sian vojon al la bibliotekaj de multaj anoj niaj! La libro (grandformata) estas havebla ĉe la libroservo LEEN prezo g. 2,25 kaj ĉe FEI : 30 bfr. Detala prospekto, aldonita jam al la aprila numero de « Nederlanda Esperantisto » estas senpage havebla.

KARTA ENCIKLOPEDIA. Unuaj 8 poŝtkartoj pri la kulturhistorio : tre interesa eld. havebla por 4 rkp. ĉe La Bosketo Whiteway, Stroud. Anglujo.

NONI KAJ MANI, du islandaj Knaboj de Jon Svensson, E-traduko de P. van den Hövel, eld. J. Habel, Regensburg, 1949, 159 p.

ROZA LUKSEMBURG, ŝiaj vivo kaj laboro, de H. Roland Holst, trad. Bas Wels, eld. S.A.T.

En « Roza Luksemburg, ŝiaj vivo kaj laboro, la fama nederlanda poetino Henriëtte Roland Holst priskribas la vivon de Roza Luksemburg (1870-1919), unu el la plej aktivaj batalantinoj por la rajtoj de la germana laboristaro kaj aŭtorino de diversaj socialismaj verkoj ekz. « Die Akkumulation des Kapitals », kunlaborantino de K. Libknecht kaj K. Kautzki, kiu pasigis la pli grandan parton de la unua mondmilito en la malliberejo, en 1919 estis murdata de siaj gardistoj kaj tuj post sia morto fariĝis kvazaŭ legenda figuro. Traleginte la Esperantan tradukon ni povas konstati, ke s-ro B. Wels, la tradukinto, sukceso plenumis sian certe ne facilan taskon. Lia lingvaĵo estas klara kaj flua kaj nur kelkloke komposteraroj, el kiuj pluraj jam estas korektitaj malantaŭe en la verko, ĝenas la leganton. Sur paĝo 10 a mankas tuta linio. Ni trovis nur kelkajn kritikindajn ekz. la uzon de infinitivo post « daŭrigi », la uzon de « nura » anstataŭ « sola ». La tradukinto enkondukis kelkajn neologismojn, ekz. « makabra », « bohemeca », « agresii », kiuj estas pravigblaj escepte de « floto ». Prave laŭ ni s-ro Wels uzas la vorton « frakcio » en politika senco, kvankam P.V. ne donas tiun signifan. Feliĉe oni en ĉi tiu verko rezignis la S.A.T.-an anstataŭigon de « kaj » per « k ». La objektiva priskribo de la temo faras la verkon ĝuebla ankaŭ por ne-socialistoj, kaj ni volonte rekomendas la legadon ĉi tiu biografio al amantoj de bonstila literaturaĵo. La libro (236 paĝa kaj fortike kartonita) estas havebla ĉe la libroservo (Prezo : g. 5,70 kaj ĉe FEI (prezo : bfr. 70.—

KIO ESTAS ROTARIO-KLUBO, eld. Komitato por Internaciaj. Servoj de la Rotario Klubo de *Te Awamutu*, Nov-Zelando, 10 p. Ĝi enhavas la difinon de Rotatio-klubo, kies idealo estas : Ni Servu; la kondiĉojn, celojn, mallongan historion. Oni substrekas ke ili havas komunan celon kun Esperanto t.e. « kulturadan de reciproka internacia komprenado kaj bonvolo ».

Mardon, la 9-an de majo 1950, geedziĝos nia membrino, F-ino *Nora Verdin*, kaj S-ro *Walter Hautekiel*. Korajn gratulojn kaj sincerajn bondezirojn al la gefianĉoj!

«INFEKTA MODA FENOMENO»

(ĉi de l'Januara « La Studento »)
Al s-ro A. J. Kalma,

Al vi patrante mi disbrakas kaj vokas — urĝe tempas, knabo, prudenti, ĉar vi tro tabakas dum vi farias, kaj krom rabo de l'sano, via ĉemizoj flavos, ĉar vi troege cigaredas!
De ĉi infekto vin nur savos admono, kiu nun vin tedas...
Ho, ne plu nun longe vi seruru la koron, kiu en la koron mian pordas, sed vi kruru konstante, kien sanan moron la homa saĝo kursas dece.
Modestu, knabo, ne skandalu, ne plu malmangu stomakstreĉe kaj pro fumado ne plu knaŭ! Ĉu tro distancas nia voko?
Ho, ke mi nepre alorelu, ke vi ekzemplu, malgraŭ moko, kaj al prudento vi fidelu...
Tyneverum.

La Poet' maljuna vagas...

La poet' maljuna vagas de l' mateno ĝis vesper' : En senlimo de l' naturo... Eterna jen Ahasver'!
Jen okulo lia serĉas, Kroĉiĝas al l'horizont'... Ĉu ne vivas li en revo, Nur de li konata mond' ?
Pezcagrenas nostalgio Pro perdita regoland', Kie tiam pri la muzo Sonis la plej bela kant'.
Li vagadas aŭtomate Paŝ' post paŝ', hor' post hor', Kvazaŭ morta, tamen viva : Ploras li pri fora glor'!
La poet' maljuna vagas de l' mateno ĝis vesper', ĝis en tomo pro ripozo mortos ankaŭ la kimer'...
Pol Varens

AFORISMOJ

de E. Bohr, Weinsheim

Foro — kion ĝi signifas por la vigla migranto ? Per ĉiu kuraĝa paŝo ni proksimiĝas al ĝi.

Ke sperto kaj scio de la generacioj eniras kun ili la tombon, ke sperto kaj scio ne estas heredebaj, jen la tragiko de l'homa vivo.

Ekzistas steloj, kiujn niaj okuloj ne rimarkas. (trad. F.W. Poppeck).

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo kostas : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume : g. 1.— aŭ bfr. 15.—

Internacia kaj feria Esperanto-Kurso. Arangitaj de G.E.E. (Asocio de esperantistaj geinstruistoj) okazos en *St. Germain en Laye* (apud Parizo) post la Universala kongreso de Parizo, internaciaj kursoj de Esperanto kun feria kunrestado. La membroj estos apartigitaj laŭ nivelo : Komencantoj, daŭrigantoj, lertuloj. La tuta arango daŭros tri semajnojn, de la 13-8 ĝis la 2-9. *St. Germain en Laye* kuŝas en belegra regiono, riĉa je monumentoj historie interesaj kaj tre vidindaj. Tiuj, kiuj ne povas tiel longe partopreni, estos akceptataj ankaŭ por du aŭ nur unu semajno.
Interesatoj sendu siajn nomojn kaj adresojn por ricevi ĝustatempe detalan cirkuleron. Adreso : F-ino Jeanne DE-DIEU, 3, rue Arzac, Toulouse (Francujo).

Mekredon la 12-an de aprilo geedziĝis Wim H. Koopmans kaj Jelly T. Schotanus, ambaŭ anoj de sekcio Hilversum de L.E.E.N. Niajn korajn gratulojn!

La 27.3.50 naskiĝis al gesroj V. Jurgens-Binoir (Vloeiende 106, Kapellen — Belg.) fileto *Leo*. Korajn gratulojn al la gepatroj kaj ĉion bonan al la infano.

Dum la somero 1950 estas en *Oberammergau*, Bavario, Germanujo, la *mondkonataj pasioludoj*. La oficejo de la ludoj nun ankaŭ aplikas Esperanton. Kontraŭ internacia respondupono (aŭ 30 pfg. en okcidentgermanaj poŝtmarkoj) oni ricevas Esperant-lingvan gvidlibreton. Ĉiujn mendojn kaj demandojn rilate la ludojn oni adresu Esperant-lingve al : Geschäftsstelle der Passionsspiele (Esperanto fako), Oberammergau, Germanujo.

Direktu vin al la Org. Komitato de la Junular-tendaro p/a Elli Rabl, Putzerstr. 102 Frankfurt a/M. Germanujo, se vi deziras partopreni ĝin. Ĝi okazos en Oberreifenberg (montaro Taunus) de la 30.5. ĝis la 4.6.; prezo DR 28!

Kontraŭ 50-100 bonaj poŝtmarkoj el via lando de jaroj 1940-1950 mi sendos saman kvanton da svedaj. Ankaŭ interŝanĝas laŭ Zumstein. S-ro Wärnö, Valla (Svedujo).

Veranto. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnstraat 38, Turnhout.